

& Ŝi jam konas lin:

< Rekante 19 el 27 batoj por strofo, entute 243 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Alois Norbert (kaŝnomo de Alois Berndl) (La mondo ridas, Vieno, 1937). Baladigis Martin Strid (2016) per melodio kaj rekantaĵo de feroa balado Filino de Torkil.>

(#Melodio:

<1,5:27> (/sodo dodo rere soso;so somi; soso soso fami remi; fa mimi re do; rere rere rereso soso somi; sososo soso famimi remi; fa mimi re do o)×9)+

(&Strofoj:

'1 /Majer volis ĉe rivero (×:; **Ja danci** ;) Kapti fiŝojn por vespero.

(×:; **Bone min ŝancis. ; Jen mi volas plankon antaŭen danci, ; kvankam vi mian vivon minacis. ; Bone min ŝancis.**)

'2 Sed la fiŝoj mokis lin Kaj ne lasis kapti sin;

'3 Fine do al si li diris: "Fiŝon la edzin' deziris,

'4 Kaj ĉar ĝin ne kaptis mi, Ĝin aĉetu mi por ŝi!"

'5 "Sed mikaŝu do la veron! Ne fatalan la aferon

'6 Ja sciiĝu la edzin', Ŝi ja certe mokus min!"

'7 Li en fiŝvendejon iris Kaj al la vendist' li diris:

'8 "Donu karpon vi al mi, Sed tutfreŝa estu ĝi!"

'9 "Bone, bone, mi komprenas. Kial vi ne salmon prenas?

'10 Estas tute freŝa ĝi!" Diris la vendist' al li.

'11 "Kial vi pri salm' parolas, Se do karpon mi ja volas?"

'12 "Via kor-edzin', sinjor', Venis antaŭ kvaronhor'.

'13 Karpo ne al ŝi konvenas, Kaj se de l' rivero venas

'14 Por aĉeti karpon vi, rekomendu salmon mi!"